# KONGRESLIBRO

# BENELUKSA KONGRESO 2024

## 20-A ĜIS 22-A DE SEPTEMBRO

**Organizado: LEA, Limburga Esperanto Asocio**




**LEA: limburg@esperanto.be**

**Esperanto.be/limburg**

**https://benelukso.eu/kongreso**

# Antaŭparolo

Vi nun legas en la kongreslibro de la Beneluksa Kongreso 2024 en Hasselt. Per tiu ĉi libreto ni volas informi vin pri ĉio kion ni planas fari dum la kongreso. Vi trovas informojn pri la organizantoj, la prelegantoj, la instruistoj, la gvidantoj de atelieroj kaj ekskursoj, la artistoj k.t.p. Vi povas konsulti la programon (kiu ankaŭ ĉiutage estos pendigita en la enirhalo). Ĉi-poste vi ankaŭ trovos informojn pri la urbo Hasselt. Vi trovas mapon kaj iom da historio.
Ni tre fieras pri la rezulto kaj ni esperas ke vi ĝuos la kongreson. Aliĝis multaj homoj el diversaj landoj. Do Esperanto utilas por paroli kun konataj kaj nekonataj, novaj amikoj.
Provu partopreni la aktivaĵojn kaj elektu kio placas al vi. Ni volas oferti aktivaĵojn por ĉiuj, tial foje estas paralelaj aktivaĵoj. Ofte la aktivaĵoj de sabate kaj dimanĉe similas. Do se vi elektis kurson sabate, vi povas elekti atelieron dimanĉe.

# Prezentado de la organizantoj

**Prezidanto: An Olijslagers**

Mi estas An Olijslagers.

Mi naskiĝis en la belga Limburgo kaj nun loĝas en Nederlando.

Mi ofte helpas organizi Esperantajn eventojn kaj nun organizas la Beneluksan Kongreson en Hasselt por vi. Mi ŝatas agi en Esperantujo kaj zorgi ke ĉiuj ĝuas esti kuni, paroli Esperanton kaj amuzi sin.

**Sekretario: Henri Schutters**

Komencis lerni Esperanton per memstudado (‘Esperanto Programita’) en 1990
Sekvis kurson ĉe Mathieu Habex en Genk 1990-1991
Startis klubon en Peer en 1992 kaj organizis kurson, gvidita de Mathieu Habex
Sekvis la 2an jaron ĉe André Staes
Sekretario de la Limburga Esperanto Asocio
Komitatano por la Limburgo Esperanto Asocio’ en la Ĝenerala Kunveno de la Flandra Esperanto-Ligo (FEL).
Honora pensiita bibliotekisto de PXL.

**Kasisto: Ben Indestege**

Mi lernis Esperanton en 1996-97. Mi multe vojaĝis per Esperanto, ĉefe per Pasporta Servo. Dum la lasta jardeko mi aktivas en LEA.

**Estrarano: Paul Hotterbeekx**

Mi estas Paul Hotterbeekx. Mi loĝas en Hamont-Achel en norda Limburgo. Mi estas edziĝinta kun Marleen kaj havas 3 filinojn.
Miaj hobioj estas ludi gitaron kaj kanti; legi, promeni, bicikli kaj kanui sur la kanalo.

**Estrarano: Emilio Vanderfeesten**

Mi estas Emiel Vanderfeesten. Mia antaŭnomo por esperantistoj kaj ankaŭ mia artista nomo estas Emilio.

Mi antaŭe agis kiel magiisto kaj estis estrarano de la magiista klubo Magic Victoria.

En Hasselt mi instruas gitarlecionojn kiel monitoro kie homoj venas ludi por amuzo sen devi fari pezajn muzikstudojn.

Se vi renkontos min dum la konferenco, vi ĉiam povas peti min fari magian lertaĵon.



# Prezentado de la helpantoj

**Instruisto: Alex Humet**



Alex Humet devenas el Katalunio sed loĝas jam delonge en Belgio. Li kutimas instrui kaj ĉiam havas amuzajn rakontojn.

**Instruisto kaj preleganto: Bert de Wit**

Mi estas biologo, pensiulo kiu laboris en la interfaco inter scienco, socio kaj politiko (RMNO, PBL). Mi verkis Esperanto-lernolibrojn kaj instruas Esperanton kaj la nederlandan perkomputile, sed ankaŭ en semajnfinaj kursoj.
Mi kontribuas al la programo per prelego pri "biologiaj mitoj". Mi jam en Esperanton tradukis tekstojn el la libro "Urini sur meduzajn pikvundojn", sed nun estas nova libro de Lucy Cooke, "Bitch" (virinaĉo), kiu donas belajn ekzemplojn de mitoj pri seksaj diferencoj.
Mi ankaŭ instruas dum la kongreso por komencantoj.

**Instruisto: Pawel Fisher-Kotwski**

Vi jam sufiĉe bone elturniĝas en Esperanto. Ne estas por vi problemo havi konversacion, respondi retmesaĝon, aŭskulti podkaston aŭ legi artikolon en revuo. Tamen... io mankas. Jen kaj jen mankas ĝusta esprimo aŭ vi ne certas pri iu gramatikaĵo. En la reto abundas materialoj por komencantoj, sed vi serĉas ion je pli alta nivelo… Venu al ĉi tiu leciono! Ni pridiskutos kelkajn

**Preleganto: Thomas Demeyere kaj Valere Dumont**

Valère Doumont estas Esperanto-aktivulo en Valonio. Estrarano de V.Esp-o kaj fondinto de la Verdaj Skoltoj. Thomas Demeyere estas denaskulo el Bruĝo, estrarano de la Verdaj Skoltoj kaj ĉef-organizanto de JES 24-25.
Ekde 2012, la asocio Verdaj Skoltoj organizas eventojn por infanoj kaj adoleskuloj en Belgio aŭ proksime. En 2024 ĝi estas ege aktiva (semajnfino en Bruĝo, tendumado en Strasburgo, tendumado en Ĉeĥio, VSKK kaj JES en Belgio). Valère Doumont kaj Thomas Demeyere raportos pri la okazintaj eventoj, prezentos la estontajn eventojn. Kaj proponos al vi kunlabori por varbi pli da infanoj, adoleskuloj kaj junuloj en Belgio.



**Preleganto: Andre Staes**

Mi estas emerita
instruisto pri lingvoj kaj amatora kultursociologo.
Mi studis politikajn kaj socialajn sciencojn, ekonomion, teologion kaj moralon.
Frapis min la vivo de Stefan Zweig. Same kiel Zamenhof li nelacigeble pledis
por repaciga politiko. Same kiel Zamenhof li kreis valorajn kulturproduktojn kaj
estis internacie konata pro tio. Ambaü devis konstati, ke milito okazis malgraü la
streboj de pacamantoj. Stefan Zweig rakontis en sia libro 'La mondo de hieraü' kiel
Okcidenta Eüropo ŝanĝiĝis dum lia vivo. Ĉu ni povas lerni ion de li por kompreni la
hodiaŭan situacion?

## Ĝenerala asembleo de BEF

Ĝenerala Asembleo de BEF sabaton, la 21an de septembro 2024, 10.30-12h en salono 2
Belga Esperanto-Federacio kore invitas ĉiujn belgajn partoprenantojn kaj ankaù eksterlandajn interesitojn al sia jarkunveno. Ni faros la bilancon de nia agado 2023-24 kaj ni pridiskutos niajn planojn por 2024-25.




## Ĝenerala asembleo de V.Esp-o

V.Esp-o, la asocio de valonaj esperantistoj, havas ĝeneralan kunvenon dimanĉe matene dum la kongreso. La tagordo estos anoncita anticipe.

Se vi volas kuntribui al la V.Esp-o agado, nepre partoprenu la kunvenon.

## Urba ludo: Verdaj Skoltoj

La Verdaj Skoltoj organizas por la junuloj ludon por konatiĝi kun Hasselt. Ankaŭ se vi ne partoprenos la Beneluksan Kongreson, vi rajtas partopreni dimanĉe posttagmeze.

## Gateball: Pierre Yves Dekerck

La belga Gateball asocio denove organizas matĉon de Gateball dum nia Beneluksa Kongreso. Estis granda sukceso en Bouillon. Do ĉiuj sportemuloj: partoprenu!



## Ateliero: Johan van Eeno



Mi estas Johan Van Eenoo el Oostkamp, Okcident-Flandrio, 67-jara, pensiita bibliotekoficisto. Mi prezentas muzikatelieron pri la **fretocitro**, tradicia popolmuzikinstrumento, konata ĉefe en Eŭropo, sed ankaŭ en Usono kien kunportis ĝin eŭropaj elmigrantoj. Ĝi estas kordinstrumento el la familio de la citroj. Ĉi-jare mi ludas la fretocitron 50 jarojn!
Ludi la fretocitron estas facile. Muzikkono ne necesas. Mi eksplikos Esperante, kaj vi povos mem ludi surloke. Disponeblos instrumentoj, materialoj kaj muziko. Konatiĝu kun tiu raviga muzikinstrumento!



**Teatraĵo: Arno Lagrange**

Li estas denaska esperantoparolanto, kaj partoprenis en teatraĵoj en Esperanto dum multaj jaroj kiel aktoro kaj reĝisoro tradukinte teatraĵojn el la franca aŭ la angla al Esperanto. En la jaroj 1976 ĝis 1979 kun TESPA (Teatro Esperanto de Parizo) : Andromaka de Jean Racine, La Justuloj de Albert Camus, La Fatomaŝino de Jean Cocteau kaj diversaj pli mallongaj eatraĵoj: Korvoj de Kisaku Tabata, Aŭtunaj ventoj de Pujula Valles, Kiel birdoj konstruas neston de William Auld, scenoj el Edipo de Sofoklo kaj partopreno en la kabaredo ≪la Ruza kruĉo≫. En la jaroj 1980 ĝis 2000 kun teatro Krizalido, Kallima kaj Epicea kun Ĉu Dio bojas de Francois Boyer, La Evento de Guy Foissy, Babel aujourd'hui (franclingva teatraĵo por konigi Esperanton), La plezuro disiĝi de Jules Renard, La amanto de Harold Pinter, Sagana (algonkenaj fabeloj), La Arkitekto kaj la Imperiestro de Asirio de Ferando Arrabal, La guerre de Troie n'aura pas lieu de Jean Giraudoux, Nuit d'ivresse de Josiane Balasko, kaj aliaj. En la jaroj 2001 ĝis 2005 kun Teatro Trupo de Tuluzo: La rekta metodo laŭ Tristan Bernard, La krimo de la strato Lursin' de Eugene Labiche, Forlasita laŭ Max Maurey, Familia etoso de Agnes Jaoui kaj Jean-Pierre Bacri.
http://arnolag.free.fr/eo/Teatro.php



**Kantado: Geomar**

Geomar (Martínez Pérez) devenas el Havano, Kubo sed loĝas en Bremeno, Germanio ekde 2018 kaj esperantumas de antaŭ preskaŭ 14 jaroj.



(foto: Ivo Miesen)


Li verkas siajn proprajn kantojn en Esperanto, kantas kaj ludas gitaron. Kubaj popolkantoj apartenas ankaŭ al lia repertuaro.

**Filmoj: Ben Indestege**

Por homoj kiuj volas sidi trankvile en la kongresejo, ni montros esperantajn filmojn je diversaj tempoj.

## Ekskurso: Diest kaj IEspA

**13:30-14:00** aŭta foriro el Hasselt, vojo 30'-35'. Interkonsentu pri komuna veturado
**14:30** alveno en **Boerenkrijgplein** (= unua vizitindaĵo), Omer Vanaudenhovelaan.
Prefera parkejoj: Halve Maan apud tiu avenuo (prefere haltu proksime de la **el**irejo).
Se trajne, eblas buso al Ezeldijk aŭ promeno al Boerenkrijgplein: 1,1 km, alvenu tie antaŭ 14:45
**14:45** ekpromenado el Boerenkrijgplein
Ni promenos laŭ Ezeldijk, beginejo, Warandeparko, Hof van Nassau, centra placo kun urbodomo kaj draphalo, naskiĝdomo de St. Jan Berchmans kaj kelkaj preĝejoj, por alveni en la nova ejo de la Internacia Esperanto-Arkivo en la Hasseltsestraat. Survoje gvidanto donos klarigojn.
Entute tio estas 2,3 km aŭ unuhora promeno.
**15:30-16:00** Alveno ĉe la Internacia Esperanto-Arkivo
(se vi preferas ne kunpromeni, vi bonvenas ĉi tie ekde la 15:30)
Vi povos viziti la ejon, sed konsciu ke ni ĵus komencis la enordigadon. La kolekto ankoraŭ ne estos tie, krom kelkaj ekzemplaj eroj. Ni regalos vin per trinkaĵo kaj etaj frandaĵoj kaj montros al vi la tutan ejon duetaĝan. La necesejo jes jam funkcios ☺.
Poste dekminuta repromenado al la aŭto.
Bonvenon en Diest kaj ĉe la Internacia Esperanto-Arkivo!





## Bicikla ekskurso: Eddy Van den Bosch

Mi estas aktivulo de BEMI (biciklista esperantista movado internacia) kaj havas iom da sperto pri biciklaj ekskursoj.
Intertempe mi faris esploradon kaj proponas gvidi ekskurson al la abatejo de HERKENRODE.
La ideo estas sekvi la indikitajn nodojn (fietsknooppunten) ekde la junulargastejo al 239 (sub la fervojo) poste sekvi 96 kaj 95 al 237.
La tuto estos malpli ol 20km.
Tre indas rezervi tempon por paŭzi ĉe la trinkejo/manĝejo en la parko de Herkenrode kaj iom promene esplori ĝin.

## Ekskurso: Centro de Hasselt kaj ĵenevra muzeo

Vidu la tekston pri Hasselt en ĉi tiu libro. Emilio gvidos vin.

## Mapo kaj promenvojo




Verŝajne ni iros buse al la **Japana ĝardeno**. Estas pluraj linio kaj daŭras 15 minutojn. Poste ni devas paŝi ankoraŭ 10 minutojn.

Al la **ĵenevra muzeo** ni povas iri piede dum ni rigardos vidindaĵojn en Hasselt:

Stationsplein, Villa Verbeelding (1), Dokter Willemsstraat, Dorpsstraat, Heilig Paterke (2), (eble fari kromvojon al la Modemuzeo (5), Paardsdemerstraat, Z33 Huis (7), maldekstren al Bonnefantenstraat, Wittenonnenstraat Ĵenevromuzeo (3), Het Stadsmus (6), Maastrichterstraat kun Turisma Servo (1), Sint-Jozefstraat (Demermanneke), Vismarkt (kathedralo), Grote Markt (malnova apoteko), Kapelstraat (Virga Jessebaziliko) (8), Groenplein kaj reen al H Hostel.

## Belga Esperanto STudsemajnfino 2025

### BEST2025

De la 21-a ĝis la 23-a de februaro 2025 okazos BEST2025 en De Iep en Ieper.
Vi povas lerni/plibonigi vian Esperanton de vendrede vespere ĝis dimanĉe posttagmeze. Ni instruos en tri niveloj.
La kostoj estas 130 eŭroj por membroj de FEL kaj eksterlandanoj, 140 eŭroj por aliaj personoj.
Pli da informoj: eventaservo.org

# Programo de la kongreso

Vendredo 20-09-2024

| Horo | Salono | Programo | Prezentanto |
|---|---|---|---|
| 13:00 – 15:00 | Foyer | Akceptejo | Henri |
| 15:00 – 18:00 | Ekstere | Vizito al la Japana ĝardeno | Emilio + An |
| 18:30 – 19:30 | Manĝejo | Vespermanĝo | |
| 19:45 – 20:45 | Manĝejo | Interkona ludo | Ben |
| 21:00 – 22:00 | Manĝejo | Muziko | Geomar |

Sabato 21-09-2024

| Horo | Salono | Programo | Prezentanto |
|---|---|---|---|
| 7:30 – 9:00 | Manĝejo | Matenmanĝo | |
| 9:00 – 10:15 | Manĝejo | Vivanta gazeto | An |
| 9:00 – 10:15 | Salono 1 | Kurso por progresintoj | Paweł Fischer-Kotowski |
| 9:00 – 10:15 | Salono 2 | Kurso por komencantoj | Bert de Wit |
| 10:30 – 12:00 | Salono 1 | Esperanto por infanoj kaj adoleskuloj en Belgio.<br>Verdaj Skoltoj, novaĵoj kaj estonteco. | Thomas kaj Valere |
| 10:30 – 12:00 | Salono 2 | Ĝeneralo kunveno BEF | Kiki Tytgat |
| 10:30 – 12:00 | Manĝejo | Muzikateliero (Hommels) | Johan van Eenoo |
| 12:30-13:30 | Manĝejo | Lunĉo | |

| | | | |
|---|---|---|---|
| 14:00 – 17:00 | Ekstere | Promenado tra Hasselt<br>+ Ĵenevromuzeo | Emilio |
| 14:00 – 17:00 | Ekstere | Gateball | Pierre Yves Dekerck |
| 14:00 – 17:00 | Manĝejo | Tabloludoj | An aŭ Rob |
| 18:30 – 19:30 | Manĝejo | Vespermanĝo | |
| 20:30 – 22:00 | Manĝejo | Teatraĵo: Ŝaknovelo de Stefan Zweig | Arno Lagrange |

Dimanĉo 22-09-2024

| **Horo** | **Salono** | **Programo** | **Prezentanto** |
|---|---|---|---|
| 7:30 – 9:00 | Manĝejo | Matenmanĝo | |
| 9:30 – 11:00 | Manĝejo | Muzikateliero | Emilio, Paul kaj Catherine |
| 9:00 – 10:15 | Salono 1 | Prelego | Bert de Wit |
| 9:00 – 10:15 | Salono 2 | Kurso por progresintoj | Alex Humet |
| 10:30 – 12:00 | Salono 1 | Ĝenerala kunveno V.Esp-o | Jean Annet |
| 10:30 – 12:00 | Salono 2 | Prelego pri Stefan Zweig | Andre Staes |
| 12:30-13:30 | Manĝejo | Lunĉo | |
| 14:00 – 17:00 | Ekstere | Bicikla ekskurso | Eddy Van den Bosch |
| 14:00 – 17:00 | Ekstere | Vizito al Diest kaj IEspA | Marc Vanden Bempt |
| 14:00 – 17:00 | Ekstere | Urba ludo por junuloj | Verdaj skoltoj |

Plie, ni ofertos ankoraŭ:

- Filmo(j)n
- Prezentadon de magiisto
- Libroservo



# La kongresejo kaj Hasselt

Spoorwegstraat 80
3500 Hasselt
hasselt@vjh.be
+32 11 45 50 81

https://www.jeugdherbergen.be/nl/hasselt

**Parkejo Alverberg Hasselt al Hostel H, Spoorwegstraat 80 (1 km promenado)**





Prenu la promenvojon dekstre ĉe la fino de la parkejo.

Daŭrigu rekte antaŭen ĉe la fino de la promenvojo.



Ĉe la fino de la konstruaĵo "Excelsior", turnu maldekstren.



Eliru la parkejon ĉe la elirejo dekstre de la verda arbo; turnu maldekstren kaj ĉe la sekva kruciĝo turnu dekstren; poste turnu maldekstren sur la ĉefa vojo (Kuringersteenweg) - ĉi tie vi povas rekte transiri per la zebropasejo kaj daŭrigi vian vojon maldekstren.

Preter la "Parklaan", turnu dekstren tuj antaŭ la ruĝa konstruaĵo, inter la ruĝaj konstruaĵoj.





Poste transiru la bushaltejon/parkejon;
malsupreniru la ŝtuparon dekstre de la stacidomo (direkto al la diversaj trajnvojoj), sed trairu ĉi tiun tunelon ĝis la fino; poste reiru supren laŭ la ŝtuparo; se vi nun iros dekstren, vi tuj vidos "Hostel H" maldekstre.

# Informoj pri Hasselt

Hasselt estas la ĉefurbo de la belga provinco Limburgo kaj havas riĉan historion, kiu komenciĝas en la Mezepoko. La urbo unue estas menciita en dokumentoj el la 7-a jarcento, kiam ĝi estis setlejo ĉirkaŭ kastelo kaj preĝejo. La nomo Hasselt probable devenas de la ĝermana vorto "Hasaluth," kiu signifas "avelarbaro," aludante al la vegetaĵaro en la regiono.

<u>Mezepoko</u>
Hasselt ricevis urbajn rajtojn en 1232 de la grafo de Loon, regiono al kiu ĝi tiam apartenis. Tio donis al la urbo pli grandan aŭtonomecon kaj stimulis ekonomian evoluon. Dum la Mezepoko, Hasselt evoluis kiel regiona komerca centro, precipe pro sia strategia loko ĉe gravaj komercaj vojoj inter la nuna Belgio, Germanio, kaj Nederlando. La urbo havis prosperan lanindustrion kaj profitis de la proksimeco de la rivero Demer.

<u>Burgundia kaj Hispana Periodo</u>
En la 14-a jarcento, Hasselt venis sub la regado de la burgundianoj, poste sekvataj de la habsburgoj. Dum ĉi tiu periodo, kaj poste sub hispana regado, la urbo alfrontis la religiajn militojn kaj la aperon de la Reformacio. Hasselt restis ĉefe katolika, malgraŭ la kreskanta influo de protestantismo en norda Eŭropo.



<u>18-a kaj 19-a Jarcento</u>
Post la Hispana Sukceda Milito kaj la Traktato de Utrecht en 1713, Hasselt venis sub aŭstran regadon. La urbo daŭre ekonomie kreskis, precipe per komerco kaj la prospero de la ĵenevroindustrio, pro kiu Hasselt ankoraŭ estas fama. En la 19-a jarcento, post la belga sendependeco en 1830, Hasselt fariĝis la ĉefurbo de la nova provinco Limburgo. Ĉi tio rezultigis pliiĝon de administraj kaj registaraj funkcioj en la urbo.

<u>Moderna Tempo</u>
Hasselt spertis rapidan urbanizadon kaj modernigon en la 20-a jarcento. La urbo fariĝis grava regiona centro por komerco, edukado, kaj kulturo. Hodiaŭ Hasselt estas konata pro sia vigla centro, kun multaj butikoj, restoracioj, kaj kulturaj eventoj. La urbo ankaŭ estas fama pro sia ĵenevromuzeo, kiu elmontras la historion de la loka ĵenevroproduktado.

Kun kreskanta loĝantaro kaj vigla kultura vivo, Hasselt restas dinamika urbo, kiu prizorgas siajn historiajn radikojn dum ĝi adaptiĝas al la postuloj de la moderna tempo.







**LEA: [limburg@esperanto.be](mailto:limburg@esperanto.be)**

**Esperanto.be/limburg**

**https://benelukso.eu/kongreso**